

Funkciado de la proporcia balotsistemo (Ernest Naville)
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-792/230, 1978 decembro 14, 16
http://www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj-mp3/Radioprelego_792_SRI_230_1978_12_14_16_Funkciado_de_la_proporcia_balotsistemo.mp3

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Dum kelkaj radioprelegoj ni interesiĝos pri la vivo kaj penso de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kies nomo estis donita al unu el la domoj de Gastejo Edmond Privat. Li estis la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Ernest Naville havis la privilegion vivi dum preskaŭ tuta jarcento. Naskiĝinta en 1816, li mortis en 1909, 94-jaraĝa. Lia ĉefa malkovro estas la proporcia balot-sistemo. Pasintan semajnon ni raportis pri la politikaj konfliktoj kun mortigoj, kiuj ripetigis en Ĝenevo je ĉiuj balotoj, kaj kiel en 1864 Ernest Naville alvenis al la ideo de nova balot-sistemo, kiu, anstataŭ doni ĉiujn sidlokojn en la decidpova instanco al la venkinta partio, donas al ĉiuj partioj reprezentadon laŭ iliaj reciprokaj fortoj.

Cl.- Hodiaŭ ni provos iomete klarigi, kiel funkcias tiu balotsistemo, kiu nun vere karakterizas la politikan vivon en Svislando, de la plimulto de la komunumoj, tra la kantonoj ĝis la federalaj instancoj, kaj tio ne nur por la decidpovaj instancoj, sed ankaŭ por la registaroj kaj eĉ plej diversaj organizaĵoj: lernejoj komisionoj, kunvenoj sindikataj, kulturaj societoj, ktp... sen forgesi la tribunalojn.

A.- En balot-sistemo bazita sur la principo de la plimulto aŭ majoritato, kiam sin alfrontas du aŭ pluraj partioj, gajnas ĉiujn sidlokojn tiu, kiu havas la plimulton de la voĉoj, kondiĉe, ke li akiru la duonon de la esprimitaj voĉoj plus unu. La landoj, kiuj konas tiun balotsistemon, vidas la alfrontadon de du tendencoj. Kiam unu venkis, tiam la alia ludas la rolon de opozicio. Ĝi provas faligi la venkinton. Kaj ĉiuj rimedoj estas taŭgaj, eĉ la plej demagogaj.

Cl.- Ernest Naville vidis en tiu balot-sistemo ion, kio ŝajnis al li kontraŭa al la kristanismo. Perforto, mensogemo, eĉ milita spirito regadis. Kiel kristano li malkovris kaj poste defendis sistemon, kiu ŝajnis al li multe pli justa ĉar ĝi respektas la malplimulton kaj faras, ke ne estas plu venkito, sed nur pli aŭ malpli multnombraj delegitaroj. Por kompreni, kio estas tiu proporcia sistemo, ni diru, ke ekzemple en unu urbo estas dudekmil balotintoj por elekti cent deputitojn. Simpla kalkulo montras, ke ĉiu deputito korespondas al ducent voĉoj. Jen tiu kalkulo:

A.- Dudekmil balotantoj dividitaj de la 100 elektotoj donas kiel rezulton la nombron 200, tio estas la voĉoj, kiujn devas ricevi unu partio por rajti havi unu elektiton.

Cl.- Ni nun imagu, ke ekzistas en tiu urbo tri partioj. La partio A estas tre potenca. En baloto ĝi gajnas la 3 kvaronojn de la voĉoj. Aŭtomate ĝi ricevis 3 kvaronojn de la sidlokoj. Kontraŭe en la majoritata balotsistemo li gajnus ĉiujn sidlokojn. La kalkulo estas tre simpla: Tiu partio ricevis 15.000 voĉojn. 15.000 dividita de 200 donas 75, tio estas 75 deputitoj.

A.- Ni imagu, ke la partio B estas ege malforta. Nur 200 voĉojn ĝi akiris. Tio signifas, ke ĝi ricevas unu sidlokon. Kalkulo: 200 dividita de 200 egalas unu deputiton. Neniam en

majoritata balotsistemo tiu partio povus havi reprezentanton. Ĝia sola batal-ebleco tiam estus perforta lukto. Nur tiel ĝi povus aŭdigi sian voĉon. Tiu partio povas esti grupo religia, rasa malplimulto, parolantoj de minoritata lingvo. En la proporcia balotsistemo ĝi povas aŭdigi sian vidpunkton en la decidpova instanco, keĵ se ĝi kapablas sendi talentan deputiton, eble tiu homo kapablos konvinki la tutan decidpovan ĉambron pri la praveco de sia vidpunkto.

Cl.- Nun, kiam ĉiu partio ricevis certan nombron da sidlokoj: La partio A 75, la partio B 1 kaj la partio C 24, tiam decidas kiuj kandidatoj estas elektitaj nur ilia vico, laŭ la nombro de la voĉoj, kiujn ĉiuj aparte ricevis. Sur la listo de la partio A la 75 kandidatoj, kiuj ricevis plej multe da voĉoj estas deklaritaj elektitaj. Sur la listo de la partio B la kandidato, kiu ricevis plej multe da voĉoj estas elektita, eĉ se estas tre malmulte konsidere al la voĉoj, kiujn ricevis la kandidatoj de la listo A.

A.- Kiam unu deputito mortas aŭ demisias, tiam ne reokazas voĉdono. Aŭtomate lin anstataŭas la postvenanta kandidato, kiu havis plej multe da voĉoj. Tio signifas, ke inter du balotoj estas vera politika paco. Tio permesas al neniu partio perdi sian plimulton inter du balotoj, kiel tio povas okazi en majoritata balotsistemo, kiam tre malgranda diferenco da voĉoj ekzistas inter la venkinta kaj venkita partioj.

Cl.- Ankaŭ la balotteritorioj ne devas ŝanĝiĝi. Ili estas fiksitaj unu fojon por ĉiam kaj korespondas al la politika divido de la lando: komunumoj, kantonoj kun eblaj distriktoj.

A.- Kiam Ernest Naville proponis tiun sistemon, ĝi ŝajnis plena utopio. Sed li kapablis konvinki eĉ la kontraŭulojn, pro tio malpli ol tridek jarojn post lia unua propono, jam pluraj svisaj kantonoj estis akceptintaj tiun balotsistemon. Venontan semajnon ni diros kelkajn vortojn pri tiu interesa politika batalo, kiu donis al Svislando ĝian politikan etoson tute karakterizan.

Cl.- La venontant semajnon ni finos nian prelegon pri Ernest Naville. Sed, en la tempo kiu restas je nia dispono, ni profitas saluti aŭskultantojn skribemajn.

A.- S-ro Pierre (...) en Dijon, Francio, skribis al ni el Rokerbrunn (?), kie li feris. Dum ripoztagoj sur la mediteranea marbordo en Rokerbrunn (?), Cape Martin apud Menton (?), mia edzino kaj mi ĝoje aŭskultis la paroladon de gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la pioniroj de esperanto en Svislando. Tre plaĉis al ni la historio de la movado. La kantoj en esperanto kun akompano de muziko estis vere raraj kaj meritas aplaŭdojn.

Cl.- S-ro Ernst Höpfler en Lipstadt (?), okcidenta Germanio, malfacile kutimiĝis al la nova elsendhoru. Tiurilate li skribis en aŭskultraporto : bonvolu pardoni min, ke mi jam tiel longe ne aŭskultis vin. Mi ankoraŭ ne kutimiĝis al via nova elsendo-tempo kaj pro tio okazas ke mi forgesas aŭskulti.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!